

Kvankam la nocioj 5573, 5837 kaj 8068 ne koncernas la traktatan komplekson, por eviti la radikon *naved...* eblas la terminoj *trajno de interkonduka trafiko* (5837), *interkonduka trajntrafiko* (5573) kaj *interkonduka trajnservo* (8068). La pli ĝeneralan terminon *interkonduka trafiko* (11137) ni jam decidis en Aalborg (vidu TeKu 105).

Mi petas sendi viajn opiniojn kaj proponojn ĝis (fino de marto 2000.) En Budapeŝt okazos komuna diskutado pri la temo.

Heinz Hoffmann

nunjare

Jen la lasta Terminara Kuriero.

Pli ol 25 jarojn

mi eldonis TK. Per ĝi ni gvidis nian komunan klopodon al granda sukceso. Mi tre kore dankas ĉiujn kunlaborantojn kaj amikojn pri la fidela sekvo de la taskodisdonoj en la decida tempo, kiu ja finfine gvidis al nia sukceso.

Pro sanstata kaŭzo mi nun devas flankenmeti la redaktoradon kaj la kunlaboron. Venas nun la tempo adiaŭi.

Mi deziras tutkore bonegan sukceson kaj progreson en la terminologia laboro, mi deziras al vi forton kaj energion en la daŭrigo de la nobla agado. Sincere via

Dieter Hartig

Feliĉan Kristnaskon

La varma, bela

Kandela lumo brilu

tra feliĉaj festotagoj !

Por 2000 niaj plej karaj

deziroj estu paco,

paco ĉie en la mondo.

Sanon al vi kaj viaj karaj

en la Nova Jaro !



Dankon pro via fidela kunlaboro.

Restu ankaŭ en 2000 kuraĝe je nia flanko.

Nia strebado tutcerte gvidos al konstanta sukceso.

La ĝis nun atingitaj rezultoj pruvas tion !

Terminara - Kuriero

TeKu 109

Decembro 1999

Komunikilo de Terminara Sekcio de IFEF

Sekretario: D-ro Heinz Hoffmann, Finstere Gasse 2, DE - 01445 Radebeul, telefono: +49 351 8385877

retadreso: IFEF.B90GR-mei@t-online.de

Redaktoro: Heinz Dieter Hartig, August-Hagedorn-Allee 55, DE-28279 Bremen, telefono: +49 421 8476806

RailLexic en 19 lingvoj !

La terminologio-datumbanko de Internacia Fervojunio UIC, nome „RailLexic“ ĝis nun ekzistas en jenaj 14 lingvoj: angla, ĉeĥa, dana, Esperanto, franca, germana, hispana, hungara, itala, nederlanda, pola, portugala, rumana kaj sveda. Ek la 3a eldono de RailLexic, laŭplane ankoraŭ ĝis fino de 1999, ĝi enhavos 5 novajn lingvojn, nome la finnan, japanan, rusan, serban kaj slovakon. Do, kompare kun la hejmlandoj de niaj sekcianoj, ankoraŭ mankas nur la ĉina, norvega kaj slovena lingvoj. Pri aliaj detaloj de la 3a RailLexic-eldono, vi estos informataj komence de 2000. *BUCCARA*

Kiu pretas traduki el la angla?

De tempo al tempo nia sekcio ricevas informojn de UIC sole en la angla lingvo. La kvanto ne tre ampleksas - dum unu jaro kelkajn paĝojn. Serĉata estas sekciano, kiu kapablas kaj pretas traduki tion el la angla al Esperanto. Interesato bonvolu informi nian sekretarion.

Nova terminara laboro

Terminologia Grupo de Internacia Fervojunio komencas paŝe prilabori unuopajn fakojn laŭ la terminologiaj principoj de Internacia Organizo por Normigo ISO. Kun la gvidistino de Terminologia Grupo, sinjorino Birgit Hoppe, mi kiel oficiala korespondanto havas bonan interretan kontakton en komuna gepatra lingvo. Tiel mi povas efektive kontribui per opinioj kaj proponoj.

La unua traktota fako estas maŝintekniko koncerne ĝeneralajn terminojn pri fervojaj veturiloj (MT40). El tiu laboro rezultos sistemigitaj kaj difinitaj nocioj, eventuale postulantaj terminkorektojn. En la prilaboro interalie gravas la fakto, ke en moderna pasaĝertrafiko pli kaj pli estas uzataj motorvagonoj kaj vagonoj kun kondukistejo por alterne tiri kaj puŝi vagonaron fare de lokomotivo. Koncerne motorvagonarojn dominas konsisto el veturilkombinaĵoj, kies firme kuplitaj vagonoj ne povas funkcii unuope. Sekve jam nun ni pripensu kelkajn bazajn terminojn, por ĝustatempe havi fundamentajn decidojn, kiuj faciligas formi derivaĵojn kaj kunmetaĵojn.

Unue serĉata estas la plej taŭga termino por jena nocio:

tuto de pluraj vagonoj aŭ partvagonoj kunligitaj per firma kuplilo aŭ artikolo tiel, ke disigo eblas nur en metiejo

Do ekzistas 2 ĉefaj specoj: tuto de pluraj vagonoj kunligitaj per firma kuplilo, kaj tuto de pluraj partvagonoj kunligitaj per artikolo. Tiaj objektoj ekzistas kaj por pasaĝertrafiko (ekzemple specoj de motorvagonoj kaj duetaĝaj vagonoj, „Talgo“-principo) kaj por vartrafiko (ekzemple „surtraka ŝoseo“, aŭtotransportvagonoj).

En RailLexic troviĝas 4 nocioj kun iom da rilato al la objekto, sed sen difino: La nocioj 3128, 7130 kaj 9098 havas la saman Esperanto-terminon *konstantkonsista vagonaro*. La nocio 7127 nomiĝas *plurelementa trajno*. Tiuj terminoj ne taŭgas por la supra difino, ĉar ne ĉiukaze temas pri tuta vagonaro (Laŭ nia PIV-propono, vagonaro konsistas el ĉiuj vagonoj de trajno.), kaj memkompreneble ne temas pri trajno. La nova termino do esprimu, ke koncernas plurajn kunigitajn vagonojn, kiuj pro teknika kaŭzo devas resti kune en normala servo.

El miaj pripensoj ĝis nun rezultis 2 proponoj, nome *vagonkombinaĵo* kaj *vagonligaĵo*

a) vagonkombinaĵo

Difinoj laŭ PIV: kombinaĵo 1 = Rezulto de kombinado
kombinado = Ago de tiu, kiu kombinas
kombini 1 = Kunigi plurajn elementojn en difinita ordo; laŭcele

aranĝi

b) vagonligaĵo

Difinoj laŭ PIV: ligaĵo = Tio, kio estas kunligita
kunligi = Kunigi, ligante
ligi 1 = Fiksi, malliberigi per ŝnuro, ĉeno ks, malhelpante moviĝon aŭ disigiĝon

Bonvolu serĉi pli trafan terminon, aŭ elekti el ambaŭ proponoj la plej taŭgan.

Grava rimarko

Ne taŭgas la termino *vagonunuo*, kvankam ĝi troviĝas en RailLexic 3121, 3123, 3135, 3136, 7121 kaj 7122. Laŭ PIV, unuo estas „abstrakta kvanto, rigardata kiel la elementa nombro, kiu servas por formi la ceterajn“. Do la vorto *unuo* ne esprimas kombinaĵon aŭ ligaĵon de pluraj objektoj.

Alikaze, la termino *manovradunuo* (7120) miaopinie taŭgas, ĉar temas pri manovranta aĵo, konsistanta aŭ el unuopa trakveturilo aŭ el serio da kunkroĉitaj trakveturiloj, traktata kiel unu tuto. Ekvivalento estas la vorto *trajnunuo*, ĝis nun ne troviĝanta en Esperanto-vortaro, sed uzata en fakaj tekstoj (ekzemple de kolego Tomišek). Miaopinie la vorto taŭgas por la nocio „tuto de veturiloj de trajno“. Ankaŭ tie ĉi temas aŭ pri unuopa trakveturilo (sola motorvagono, sola lokomotivo kiel trajno) aŭ pri serio da kunkuplitaj trakveturiloj (vagonaro kun lokomotivo, motorvagonaro). Se

lokomotivo trakcias vagonaron, la nocio koncernas vagonaron plus lokomotivon. Se la trakciilo estas motorvagono, *trajnunuo* kaj *vagonaro* estas identaj. La nocio troviĝas en RailLexic 2106 kaj tie havas la tute malĝustan Esperanto-terminon *trajnveturo (statistike)*.

Por klarigi la diferencon inter la nocioj 9018 (trajno) kaj 2106 (trajnunuo), jen ekzemplo: Se pasaĝervagonaro kun trakciilo sen modifo de la konsisto trifoje dum tago trafikis de stacio A al stacio Z kaj reen, estas 6 trajnoj, sed nur 1 trajnunuo

Tamen, eventuale vi proponas pli trafikajn terminojn anstataŭ *manovradunuo* kaj *trajnunuo*.



Plue serĉata estas nova termino anstataŭ *pasaĝervagono kun kondukistejo*. Kvankam la ĝisnuna termino sub RailLexic 9834 estas ekzakta, pro sia longeco malfacile eblas formi derivaĵojn kaj kunmetaĵojn. Tio grave necesas por nomi **vagonaron aŭ trajnunon, je kies kapo troviĝas vagono kun kondukistejo por observi la vojon kaj regi la trakciilon**.

Tiu nocio troviĝas en RailLexic 7134 (koncerne vagonaron) kaj RailLexic 9165 (koncerne trajnunon) kaj havas la Esperanto-terminon *navetrajno*. Fakaj tekstoj pri moderna fervojo (ekzemple de kolego Glättli) ofte enhavas la terminon. La adjektivo *naveta* 2 (en la nova PIV anstataŭe aperos *naveda*!) signifas *ir-reira*. La ĝisnuna uzo de la radiko *navet...* estas ĥaosa. Oni iam decidis la terminon *navetrajno* ne nur por la menciitaj nocioj 7134 kaj 9165, sed ankaŭ por la nocio 5837, kiu temas pri kurtkurso trajno en interkonduka trafiko (11137) aŭ pri trajno por iuj ajn „navetuloj“. La difino ja mankas. Aliaj kunmetaĵoj estas *navetrafiko* (5442 - rilate al 9165), *navetrajna trafiko* (5573 - rilate al 5837) kaj *navetrajna servo* (8068 - rilate al 5837).

Miaopinie, okaze de la modifo al *naved...* en la nova PIV, ni evitu tiun radikon rilate al trajnoj. Jen mia propono: Se ni decidus por la nocio 9834 (*pasaĝervagono kun kondukistejo*) la koncizan terminon (*gvidvagono*, eblus formi la kunmetajn terminojn *gvidvagonaro* (7134), *gvidvagona trajnunuo* (9165) kaj *gvidvagonara trafiko* (5442). Alia eblo anstataŭ *gvidvagono* estas (*pilotvagono* laŭ la franca *voiture-pilote*, kvankam laŭ PIV piloto estas maristo aŭ ano de aviadila personaro. La proponoj por kunmetaĵoj harmonias kun la danaj terminoj *styrevognstog* (7134, 9165) kaj *kørsel med styrevogn* (5442).

Bonvolu serĉi pli trafan terminon, aŭ elekti el la proponoj *gvidvagono* kaj *pilotvagono* la plej taŭgan. STIR VAGO 00